

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 532

FEBRUARO 1950

INVITO AL CIELO

de

JAMES D. SAYERS

Finfine aperis la jam malpacience atendita originala romano en plaĉa vesto.

La konata aŭtoro skribis utopian manuskripton, kiu kelkfoje forrabas la spiron de la leganto, kaj kiu tamen ĉiam pripensigas lin pri la problemoj ekskuontaj la homaron. Sensacia libro, kiu sendube trovos siajn tradukantojn por naciaj lingvoj.

205 paĝoj, blanka papero, duontole bindita, multkolora ŝirmkovrilo.

Prezo : 15 ŝilingoj, afranko 6 pencoj.

Eldonita de
SIEGFRIED ZIEGLER ELDONEJO (ESPERANTO-FAKO),
München-Pasing, Germanujo.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondokuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kiuj ĉiulandaj lingvospertaj samideanoj, skribmaŝinon uzantaj, akceptos nacilingven traduki mallongajn varbtekstojn E-lingvaj, kiujn ni sendos? Tramonda-Esperanto, Mulhouse, Francujo.

La Esperantistaj Framasonoj, kiuj intencas partopreni la Kongreson en Parizo 1950, estas petataj skribi al Mitthey, 45 rue Ordener, Paris 18, pri eventuala solena kunveno dumkongresa.

Pariza fraŭlino nepre respondos al ĉiuj gesamideanoj tutmondaj kiuj al ŝi skribos: F-ino Paulette Dalty, 23 rue Fourcroy, Paris, Francujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage per la Internacia Katolika informejo. Sekretariejo: Fraterhuis, Loonopzand (N. Br.), Nederlando.

Poŝtmarkojn deziras interŝanĝi ĉiulande, Flensberg, Borchsvej, Holbaek, Danlando.

Komercestoj, Fabrikistoj! Eksportu viajn varojn al Kongo Belga! Sendu viajn proponojn tuj kaj detale al S-ro A. Reubens, importisto, B.P. 386, Jadotville, Kongo Belga, Afriko.

La Budhista Societo de Vieno serĉas por siaj anoj tutmondajn gekorespondantojn kaj interŝanĝon de gazetoj. Skribu al S-ro D-ro Franz Oprchal, Wien I, Börseplatz 3, Aŭstrujo.

F-ino Saito-T., c/o Seirei-ryo, 556 Kitizyozi Musasino si, Tokio, Japanujo, deziras korespondi kun ĉiulandaj bankoficistoj.

Deziras interŝanĝi il. p.k. kun ĉiuj landoj por propagando. Nepre respondos. Howard H. Lawrence, US PO, BRYAN, Ohio, Usono.

S-ro Miloslav Bartl, katolika pastro, interŝanĝos poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Nepre respondos. Adreso: Vápenny Podol, Zelezné hory, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro Ludvik Málek, oficisto, Vápenny Podol, Ĉeĥoslovakujo, interŝanĝos poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun la tuta mondo: nepre respondos.

Finante Esperanto-kurson en Marto ni aranĝos letervesperon. Ni petas lerojn kaj kartojn al Josef Lederer, Šluknov stacidomo, Ĉeĥoslovakujo.

Membraro de Protestanta dimanĉlernejo deziras interŝanĝi lerojn kun aliaj dimanĉlernejoj en ĉiuj mondpartoj. Skribu unue al S-ro E. Revill, 13 Highbank Drive, Manchester 20, Anglujo.

Tendisto deziras korespondi pri turismo, ankaŭ pri naturscienco. S-ro Blake, Tower Hill, Horsham, Anglujo.

Abelbredisto deziras korespondi kun samideanoj Itala kaj Hispana; nepre respondos. S-ro Blake, Tower Hill, Horsham, Anglujo.

Letervesperon aranĝos L.E.E.N.-sekcio Deventer je 15-4-1950. Sendu lerojn, poŝtkartojn, revuojn al la sekretario, C. B. Zondervan, J. P. Sweelinckstraat 2, Deventer, Nederlando.

F-ino Claudia Tecchio, Rua Barão Ijuí 13, São Paulo, Brazilo, deziras korespondi letere kaj poŝtkarte kun ĉiuj landoj. Respondo garantiita.

Kolektanta Rondo restariĝas. Filatelitoj petu tuj senpagajn informojn: skribu amase al R. Melo, Meylieu (Loire), Francujo.

Filatelisto deziras seriozajn interŝanĝojn; ĉiam respondas; ne sendas unue. Melo, Meylieu-Montrond, Francujo.

Juna muzikanto deziras korespondi kun aliaj landoj. Ladislav Weiss, muzikanto, Česká Lipá, Ĉeĥoslovakujo.

Librojn pri ĵujutsuo, lukto, persondefendo, stenografio, aĉetus D-ro Ricolfi, Casalmonferrato, Italujo. Korespondus pri tiuj temoj.

Sovetianan korespondanton per ilustritaj poŝtkartoj serĉas s-ro Tito de Barros Junior, farmaciisto, Av. Epitacio Pessoa 28, Santos, Brazilo.

Studento, 18-jara, deziras korespondi tutmonde. Dettwiller, Cerf-Volant 27, Moulins (Allier), Francujo.

Antonio Sidrach, Provenza 37, 5, I, Barcelona, Hispanujo, sendos 25-30 stampitajn malsimilajn hispanajn poŝtmarkojn interŝanĝe kontraŭ la sama kvanto el via lando.

Interŝanĝas poŝtmarkojn en granda kvanto kun ĉiuj landoj s-ro Imre Fános, Parajdi 8, Szeged, Hungarujo. Nepre respondos.

Anglo, 35-jara, inĝeniero, deziras ekkoni fremdulinojn, celo geedziĝon. Sendu foton al BM/GFPE, London, W.C.1.

Atentu! 15 lernantoj novaj deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo. Skribu al nia letervespero okazonta 20-3-50. Adreso: Esperanto (Gösta Persson), Box 79, Åstorp, Svedujo.

Du fratinoj—17-jara Basia (pianistino) kaj 15-jara Krysia, ambaŭ danclernejaninoj, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo prefere per belaj bildkartoj. F-inoj Basia kaj Krysia Sluzalkówna, Bielsko n/Sl., Mickiewiczza 30, Pollando.

18-jara dancistino kaj pianistino deziras korespondi tutmonde pri muziko kaj aliaj temoj. F-ino Danuła Wachówna, Bielsko n/Sl., Mickiewiczza 30, m. 4, Pollando.

Mi deziras korespondi per belaj bildkartoj kun seriozaj gesamideanoj de ĉiuj mondpartoj. Certa respondo! S-ino Wanda Bydlinska, oficistino, Bielsko n/Sl., Dabrowskiego 14, m.2, pollando.

S-ino B. CALVET

MODERNYX FIRMO

26 Rue Capitaine Escudié, Toulouse, Francujo

Tel: 200-69. (Komerca agento: S-ro R. Valade)

(Ano de Esperanta Komerca Ĉambro)

Vendataj pogrando: cigared-bruligiloj, silikŝtonoj (en tuboj aŭ nepakite), marokenaĵoj, imit-juveloj, subvestoj, kombiloj. Ĉiuj varoj haveblaj laŭ peto.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO Februaro 1950

N-ro 532 (2)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinta : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro :
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 5 ŝil. : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondukuponon por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

PARIZO 1950

Parizo magia nomo elvokanta dezirojn kaj la memoron de pasintaj tagoj, de gajeco kaj juneco. Metropolo el kiu eliris grandaj ideoj; lumurbo samtempe revolucia kaj tradiciema, sopiro de elegantulinoj ĉiulandaj, revo de studentoj, neelĉerpebla temo de filistroj, la Meko de la kultura mondo, ree ĉi akceptos la Universalan Kongreson de Esperanto en aŭgusto nunjare. Ĉiu vorto, kiun oni diras pri Parizo tamen ne estas sufiĉa, ĝi estas kaj restas la sumo de ĉio grandioza. Aliaj metropoloj posedas siajn allogaĵojn, sed Parizo kunigas ĉiujn !

Por la tria fojo la Franca ĉefurbo gastigos la Kongreson de Esperanto. En junaĝo ni atendis la momenton por la forveturo al la Deko en 1914, kiu devis iel fariĝi decida por nia afero. Kia malĝojo por Generalo Sebert, tiu distingita pioniro, sperti tian sortobaton, kia estis por li tiu malfermo-fermo, en la sama momento, de la Deko Kongreso ! Anstataŭ paroloj de paco, jam batis tamburoj vokantaj al milito. La duan fojon ni iris al Parizo en 1932 por la 24-a kongreso, jam sub la ombro de la okazontaĵoj en Germanujo. Por la tria fojo ni preparas nin. Mi firme kredu je la sukceso de nia 35-a !

La kongresanoj havos okazon renkonti malnovajn pionirojn jam kunlaborintajn por la Deko. La 35-an organizas du bone konataj samideanoj, S-ro Georges Warnier kaj D-ro Jean Couteaux, ambaŭ harditaj en la batalo, konantaj nian movadon de supro ĝis malsupro. Ni revidos Raymond Schwartz "*la ĉarma an' de Epikur*", forta en *verso kaj karikatur* ! Ne forgesota—Generalo Bastien, nia Honora Prezidanto, la Nestoro de nia movado.

Esperdona programo, bazita sur spertoj de la lastaj kongresoj, nin allogas. Ni respondu per tuja aliĝo por simpligi kaj faciligi la preparaĵojn. La Loka Kongresa Komitato faros ĉion por ke anoj el eksmalamikaj landoj povu ĉeesti nian pacan manifestacion. Dezirinde estas, ke ĉeestu delegitoj ankaŭ el orient-eŭropaj landoj, ke ili ne estu malhelpataj kiel ĉe la pasintaj kongresoj pro la malsano de nia epoko: *vizo kaj devizo*. Nia 35-a Kongreso estu sukceso kaj fariĝu memorindaĵo de la partoprenantoj.

H. J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstrujo

Fervojistoj kongresos en Salzburg

La 2-a Kongreso de I.F.E.F. okazos de la 17-a ĝis 21-a de majo 1950 en Salzburg. Por ricevi informojn vin turnu al: Organiza Kongreskomitato, Postfach 65, Salzburg I, Aŭstrujo.

Notinda afero estas tio, ke en la tagoj 27-a ĝis 30-a de majo (tuj post la fervojista kongreso) okazos en Vieno la 4-a Aŭstria Esperanto-Kongreso. Kiu intencas resti en Aŭstrujo por partopreni en ambaŭ kongresoj, tiu sin anoncu al la O.K.

En ĉarma kaj bela parto de Tirol, malnova samideano S-ro Hilkersberger en urbo Landeck, Lötzweg 1, domo Espero, konstruis Esperantistan gastodomon en kiu samideanoj povas malmultekoste gasti. Interesatoj sin turnu senpere al la citita adreso.

Britujo

Instruista konferenco en Londono

Je 31-a de decembro la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj okazigis sian ĉiujaran kunvenon en la sidejo de la B.E.A. En la aferkursido oni diskutis interalie la rilatojn kun la nove fondita Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

S-ro L. Gordon Watson raportis pri la T.J.O.-kunveno en Versailles kun multaj konstruaj kritikoj pri la aranĝoj. En la vespero S-ro Mason Stuttard prelegis kaj iniciatis diskuton pri *Plena Vortaro de Esperanto*.

Ĉeĥoslovakujo

Verda Stacio ankoraŭfoje brilas

En la vespero de la 4-a de jan. la Verda Stacio—la fiero de la tutmonda Esperantistaro sur la tereno radia—faris duan dissendon de la opereto *Ĉeĥa Belleĥemo*, antaŭe dissendita en decembro. Neeblas tro laŭdi la altnivelan prezenton ĉar la partoprenantoj sen escepto faris belegan impreson. La kantistoj kaj orkestro ĉarmis per melodioj de rava dolĉeco kulminantaj per muziko de vere Handela majesto. La samideanoj nepre direktu siajn dankesprimojn kaj laŭdojn al ĉi tiu fidela kaj talenta grupo de artistoj, kiuj monaton post monato pruvas — se pruvo estas necesa — ke Esperanto estas senegala perilo por la redono de plej alta arto. Oni atendas senpacience la dissendon de *La Vendata Fianĉino* de Smetana en februaro.

Hungarujo

La raportoj el Hungarlando ne estas tre esperigaj. La oficiala organizaĵo, H.E.S. pro manko de subteno devis maldungi sian salajratan

oficiston. Dum duono de jaro ne aperas *Hungara Esperantisto* kaj tio verŝajne kontribuis al la subita stagno pro perdiĝo de kontaktigilo. Estas espereble, ke tiu fazo estas nur transira, ke la samideanoj tie baldaŭ povos reorganizi sin kaj antaŭeniri al novaj venkoj.

Izraelo

Okazis je 9-10 de okt. 1949 la unua Landa Esperanto-Kunveno de Izraelo en Tel-Aviv. La fotografaĵo montras la gesamideanojn antaŭ la kongresejo.



Nederlando

Esperanto en lernejoj kaj ĉe sciencistoj

En la nuna tempo Esperanto estas instruata ĉu devige, ĉu fakultative en 4 seminarioj por geinstruistoj, 15 publikaj, 3 katolikaj, 4 kristanaj lernejoj, 1 mezgrada teknika lernejo, 1 mezgrada ĝardenkultura lernejo ŝtata, kaj blindul-institucioj en Bussum kaj Grave. Entute 866 geknaboj ricevas instruon pri Esperanto. Tiuj faktoj, certe ne la tuta bildo, estas gravaj por kompilantoj de statistiko pri Esperanto en la lernejo.

* * *

Post interkonsento kun la prezidanto de Asocio de Sciencaj Esploristoj, Prof. D-ro Minnaert, (de *Verbond van Wetenschappelijke Onderzoekers—V.W.O.*) la sekretario de Asocio de Nederlandaj Sciencistoj Esperantistaj ricevis inviton preparoli la temon *Mondlingvo* en estrarkunveno de V.W.O., la 23-an de oktobro, 1949. Oni disponigis por la prelego kaj diskuto unu horon. La sekretario de A.N.S.E. kun S-ro Ir. Isbrucker kaj D-ro Manders kontribuis al la diskuto. La kunveno poste kaj unuanime petis artikolon por la asocia revuo, por ke ankaŭ la membroj pripensu la aferon. Tial ke ĉi tiu organizaĵo estas sekcio de internacia asocio, estas konsilinde, ke alilandaj sciencistoj faru similajn paŝojn ĉe sialanda estraro.

ESPERANTISMAJ PROBLEMOJ

IX.—Esperanto—sektio ?

Ĉiu movado celanta socian plibonigon konas proksimume la saman evoluon : iniciato de profeto-similanta idealisto, sekvata de kelkaj fervoruloj, kreo de grupoj aŭ komunumoj, gajno de la publika opinio, kaj fine, laŭ la karaktero de la ideo, rekono per ŝtataj dekretoj, la oficialigo. Nur malofte tiu kvazaŭ logika evoluo ne okazas, malofte mankas la ŝtupoj inter profeto kaj ŝtata oficialigo. Tio efektive okazis tamen ĉe la Ruĝa Kruco. Henri Dunant sin turnis senpere al la ŝtatestroj mem kaj tiuj bonvolis aŭskulti la fervoran apostolon de praktika homamo. Nur poste kreĝis la societoj de la Ruĝa Kruco. La evoluo ne estis de malsupro al supro, sed inverse.

Identa al ĉiu movado religia aŭ socia estas ankoraŭ unu faktoro, *la libro*, kiu formulas la ideojn. La fondo de la Ruĝa Kruco estis antaŭata de la verko *Solferino*, priskribo de la batalo inter Aŭstroj kaj Sardoj (1856), pri la suferoj de la vunditoj kaj la primitiva servo por mildigi iliajn suferojn. Dum la sama epoko, kiam en Genevo kunsidis la delegitoj de la ĉefaj registaroj por doni statuton al la ideo de Henri Dunant, furiozis fratmilito usona por la forigo de la sklaveco. Ankaŭ tiun kelkjaran militon, kiu minacis detruiri la unuecon de la Unuigintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko, antaŭis libro, milionfoje legita, kaj tradukita en centon da lingvoj, la fama *La Kabano de Onklo Tom* (Toĉjo). Oni povus facile plilongigi la liston por pruvi la aserton, ke libro—do skribita parolo—estis ĉe la komenco. Ĝi ne nur inaŭguris la bonon, sed ankaŭ la malon, kiel estas konstataleble per la apero kaj disvastigado de *Mein Kampf*, tiu milit-deklaro al humaneco kaj homrajtoj.

Ĉiu movado devas sperti la nekonstantecon de ĝiaj anoj kaj la apartigon en opoziciaj grupoj. Estas superflue doni ekzemplojn ; ĉiu konas la fenomenon, ofte tamen la fonton de efektiva progreso. Tio venigas nin al la demando, ĉu la apartigemo—alivorte la sektismo—prezantas ian danĝeron por ni ?

La unua demando respondota estas, kia estas la *sektismo* en nia movado ? En verko titolita *Verkappte Religionen* (Maskitaj religioj) aperinta

en 1925, la aŭtoro citas ankaŭ nian movadon, kiel religi-similan ideon, kaj opinias, ke ĝia tendenco, savi la mondon de pereco, karakterizas ĝin kiel specon de religio aŭ sektio.

Certe estas, ke nia societa vivo, la kongresoj, la kunvenoj, la flago, himno kaj la efektiva entuziasmo inter la adeptoj povas kredigi, ke Esperanto estas ia speco de religio. Ne malmultaj Esperantistoj neis la *internan ideon* de Esperanto, t.e. la provon doni al la movado ian moralan kernon. Ili opinias, ke Esperanto estas *lingvo*, kaj nenio alia estas ligita aŭ ligebla al ĝi. La realo estas en la mezo. Nia ideo povas venki nur per ambaŭ karakterizaĵoj : la nurlingve-praktika kaj la homaran-idealisma. Estas ofte konstataleble, ke la anoj de unu tendenco rigardas la anojn de la alia kun ia sento de kompatema supereco. Tio precipe estas vera pri la nur-praktikulo, kiu vidas en idealisto utopiulon, se ne strangulon, kaj tutcerte, sektulon !

Ĉi tie ni tuŝas la kernon de la afero. Ĉu nia movado, kiel tutaĵo, estas tia *maskita religio* aŭ ĉu ĝi estas sektio ?

Ni opinias, ke nek unu nek la alia ! Religio estas la tutaĵo de la rilatoj de la individuo al la dieco, ĝi estas la morala kodo de la homo. Ĝia deveno estas mistika. Ĝia celo estas levi la homon el la ĉiutaga banalaĵo, kaj ĝiaj rimedoj por atingi la celon estas : la kredo, la amo kaj la espero. Pri la apliko en la ĉiutaga vivo ni ne parolu ĉi tie. Religio serĉas plibonigi la homon por ke li estu inda je la vivo eterna.

La movado por internacia lingvo, do por Esperanto, celas alporti eron por la kreota pli bona homaro. Ĝi volas kompletigi la multajn klopodojn tiucelajn, tiom sociajn kiom etikajn, per la faciligo de la rekta interkompreno lingva. Ke ĝi povas altgrade entuziasmigi kaj krei verajn apostolojn estas ŝatinda kaj neniel malhavinda aktivaĵo.

Pri la dua problemo, la sektismo (apartigemo) inter ni mem, traktos venonta artikolo.

Hans Jakob.

Instruist-kursoj en Berlino

Sub aŭspicoj de la ĉefa (okcidenta) instru-oficejo de Berlino nun okazas speciala kurso de Esperanto por estontaj instruistoj. Pli ol 20 personoj partoprenas kaj ilin gvidas S-ro Erich Dahlmann. Estas precipe grave havi en Berlino instruistojn scipovantajn Esperanton, ĉar de la 7-a lernjaro Esperanto estas libervola fako en la tiaj lernejoj.

Usono

En la urbcentro de Detroit dum la monato decembro staris grandega afiŝo sur la supro de 8-etaĝa konstruaĵo, lumigata vespere per multaj elektraj lumoj, kaj videbla el ĉiuj ĉefstratoj ĝis distanco de duonkilometro. La literoj estis unu metron altaj. La teksto estis *Gaja Kristnasko*. Vidu paĝon 31.

JUGOSLAVUJO

La unua en la internacia konkurso de U.E.A., 1949

En *Esperanto* regule aperis modesta rubriko sub la titolo *Internacia Konkurso 1949*. Mi ne scias, kiom da abonantoj legas ĝin, kiom da ili pensas pri la rezultoj atingitaj en la diversaj landoj. Mi tamen estas certa, ke por ĉiu homo, kiu vere profunde, kun sia tuta koro estas alkröcita al la afero de Lingvo Internacia, tiu seka statistiko devas esti eksterordinare interesa. Ĝi estas iaspeca termometro pri la fortiĝo aŭ malfortiĝo de nia movado en diversaj landoj, sed samtempe mezurilo de la ĝeneralaj kulturaj strebadoj de la koncerna popolo, strebadoj, kiuj nepre devas respeguliĝi ankaŭ je la Internacia Lingvo.

La statistiko aperanta en la nuna numero montras, ke Jugoslavujo okupas la unuan lokon kun 224-procenta progreso kompare kun la kvoto fiksita surbaze de la antaŭmilita stato.

Oni ne rajtas forgesi, ke Jugoslavujo estas unu el la landoj, kiuj plej suferis dum la pasinta milito. Inter 1.700.000 militviktimoj troviĝis pli ol 1.000 Esperantistoj, kiuj estis organizitaj antaŭ la milito. Dum la milito, pro la teruraj detruoj, la popolo tre malriĉiĝis kaj, interalie, la havaĵo de la Esperanto-movado estis bruligita. Se oni konsideras ĉion ĉi, ankoraŭ pli elsaltas la fakto, ke Jugoslavujo estas la unua en la konkurso.

Ĉu do la rezulto estas nur hazardo, aŭ ĉu eble la poentoj en la konkurso ne spegulas la staton de Esperanto en Jugoslavujo?

Nek unu, nek la alia! La rezultoj de la konkurso nur pale reflektas la entuziasman reekfloron de nia afero en Jugoslavujo.

Longjara, tre insista, planita, serioza kaj sobra propagando—sen multaj flagoj kaj steloj, sed kun des pli multe da argumentoj—altiris al Esperanto tre sanajn elementojn el rondoj intelektulaj kaj laboristaj. La vivo en la societoj kaj grupoj—kun altnivelaj prelegoj, parolataj gazetoj, artaj kaj literaturaj vesperoj, riĉaj konstantaj kaj vojaĝantaj bibliotekoj, legejoj kun gazetoj el la tuta mondo—forte ligis kaj ligas al Esperanto la malnovajn adeptojn kaj la novulojn. La konstanta ekskluziva uzado de la Internacia Lingvo ne nur dum societaj kunvenoj, komitataj kunsidoj k.t.p., sed ankaŭ en la privata vivo, faris el Esperanto vivantan, flue kaj senĝene parolatan lingvon. *La Suda Stelo*—la oficiala 16-paĝa organo de J.E.F., kiu nun havas pli ol 2.000 abonantojn—estas vera fiero de ĉiu jugoslava Esperantisto, sed ĝi estas ankaŭ alte taksata en aliaj landoj pro la bona enhavo kaj altnivela lingvo.

Ĉio ĉi faras, ke Esperanto konstante, de tago al tago, gajnas novajn poziciojn kaj plifirmigas la

malnovajn. La Esperanto-movado estas fakte—dank' al longjara plana laboro—konsiderata de la jugoslava publika opinio kiel atentinda kultura faktoro. Kiam la Esperantistaro en kiu ajn lando atingas tion, oni vere povas konsideri, ke la perspektivoj de plua disvastiĝo de la lingvo estas bonaj.

Estas akcentinde, ke en Jugoslavujo ni neniam petis, nek ricevis, ian ajn monsubvencion. Ni ne havas pagatajn oficistojn. Nij kursgvidantoj, redaktoroj, verkantoj de lernolibroj, artikoloj k.t.p. ne estas rekompencataj. La tutan laboron por Esperanto oni faras ne nur plene senpage, sed oni eĉ ofertas ĝis plej alta grado kaj tempon kaj materiajn rimedojn por la afero. Tial en la kaso ĉiam troviĝas mono, kvankam oni sufiĉe elspezas por la propagando, por la ejoj, por bona organizo de la kursoj.

Mallonge: la tri ĉefaj sektoroj de nia agado—propagando, kursoj, praktika utiligo—estas harmonie kunligitaj kaj tial la tuta afero, malgraŭ la malfacilaĵoj, kontentige marŝas.

Estante ofte en eksterlando kaj havante, sekve, plej malgrandan personan meriton por la reekfloro de Esperanto en Jugoslavujo, mi kuraĝas direkti elkoran gratulon al la jugoslavaj Esperantistoj pro la farita kaj farata laboro. Aparte menciindaj estas la ĉefdelegito de U.E.A. Kasović, la vicprezidantoj de la Federacio Kozlevčar, Rehorič kaj Jakupović, la sekretariino Nadja Gropuzzo, kiel ankaŭ D-ro Jovanović, Krajl, Vajdlj, Vančik, Mizerit, Emilija, Jorganović, Petković, Gjivoje, Elza por citi nur kelkajn el dekaj kaj eĉ centoj, kies oferemo rezultigis tiel elstaran rezulton kaj moralan pozicion de Jugoslavujo en la tutmonda movado.

Mi volas peti pardonon de la alilandaj Esperantistoj por tiuj ĉi vortoj dediĉitaj al mia lando. Ilin ne kaŭzis ia nacia fiero, sed Esperantista fiero. Ni jugoslavaj Esperantistoj estos tre kontentaj se la aliaj landaj asocioj laboros pli ol ni kaj se ilia laboro respeguliĝos ankaŭ en la konkurso de U.E.A. Oni memoru, ke ĝuste la jugoslavaj komitatoj de U.E.A. estis tiuj, kiuj eble plej multe kritikis, se ili opiniis ion malbona en nia organizaĵo. Sed samtempe ili subtenis ĝin. Nia vidpunkto estas, ke ĉiu Esperantisto devas nepre unue esti membro de la internacia organizaĵo, sed ke lia morala devo kaj rajto estas ankaŭ fari sian eblon por fortikigi ĝin kiom eble plej. Unu el la rimedoj tiucelaj sendube estas sana kaj konstrua kritiko.

Prof. D-ro Ivo Lapenna.

TRA LA LIBRARO

* = akireblaj ĉe U.E.A.



***Invito al ĉielo.** Originala romano de James D. Sayers. Eld. D. Ziegler Eldonejo, München, Germanujo. 205 p. 18×12cm. Bind. prezo 15 ŝil.

La aŭtoro de ĉi tiu verko kredas sin komisiita fari komunikaĵon al la mondo kaj, kiel multaj liaj antaŭuloj, li prezentas ĝin en formo de romano, kies plano certe estas konata al la plejmulto el liaj legantoj, ĉar multaj romanistoj jam uzis ĝin. Iu sciencisto kaj lia amiko, ĵurnalisto, vojaĝas de la Tero al la planedo Marso per maŝino speciale konstruita por vojaĝado tra interplaneda spaco; kaj tie ili ricevas informon, kiu estas tre grava por la Teranoj, kaj kiun ili devas reporti al la Tero. Ĉi tiu informo estas, mallonge, antaŭaverto pri la alproksimiĝo de Har-magedono, la fina kaj plej detrua batalo inter Malbono kaj Bono sur nia planedo. Dum ili ankoraŭ estas sur Marso, la vojaĝantoj trovas, ke tiu fina batalo furiozas sur la Tero, kaj ke multaj ĉefurboj estas jam detruitaj per atombomboj.

Tia estas la plano de la romano. Tamen la verko estas io pli, ol simpla romano. En ĝia kadro la aŭtoro prezentas skizan historion pri la origino kaj evoluo de nia sunsistemo, la tero kaj la homoj (el kiuj li priskribas du specojn, biologie similajn sed spirite malsimilajn). Li skizas la historion de la homaro tra la praepoko kun ĝiaj malkvieto kaj grandaj krizoj. Li antaŭvidas la alproksimiĝon de Har-magedono, kiun li identigas kun la tielnomata atommilito, kaj li prezentas (en granda parto de la libro) sian kredon pri la estonta evoluo de la homaro kaj ĝia civilizo. Post Har-magedono komenciĝos la epoko de amo kaj paco, kiam la homoj kunlaboros en plena frateco, suprenirante laŭ la "Vojo Supren", kiu kondukos al perfekteco korpa kaj spirita.

Sub la tuta rakonto ŝajne kuŝas kredo pri iu fera Antaŭ-destinismo: ĉiuj malbonaĵoj kaj suferoj de la surtera vivo estas neeviteblaj kaj ja necesaj por la evoluo de la homaro. Tamen fine, en epilogo, la aŭtoro alvokas ĉiujn amantojn de la Vero agi tiel, ke Dio forturnu la minacantan katastrofon, kaj ke la nacioj kuniĝu en konferenco sub la Dia gvido, por starigi veran demokratian familion de la homaro. Finfine li alvokas la Esperantistojn fari sian parton en ĉi tiu tasko.

Ne ĉiu leganto konsentos kun S-ro Sayers pri la de li donita interpreto de faktoj sciencaj kaj historiaj, aŭ pri lia instruo pri la fina destino de la homo. Sed tra la tuta verko forte evidentiĝas la sincereco de la aŭtoro: estante mem, verŝajne, vera homamanto, li deziras fari ion por gvidi la

homfratojn al pli granda feliĉeco kaj perfekteco. Tiajn homojn la mondo jam vidis, kaj ĝi ignoris ilin, se ĝi ne ŝtonmortigis ilin. Se ĉi tiu voĉo de kianto en la dezerto influos sur nur kelkajn homojn, ĝi estos plenuminta utilan rolon.

Noto ĉe la fino de la libro sciigas nin, ke S-ro Sayers estas konata Usona romanverkisto. Eĉ sen tiu sciigo, oni povus konstati, ke ĉi tiu verko, kies stilo estas tiel flua kaj klara, estas la verko de spertulo pri la romanverkado; ĝenerale la lingvo estas bona, kvankam jen kaj jen troviĝas eraroj. Ĉi tie mi menciis nur *ĉion-inkluda* (p. 66) prefere *ĉion-inkluziva*; la kelkfojan uzon de *ĵus* anstataŭ *ĝuste* (ekz. p. 22: *estas ĵus nun fanfaronema*); kaj la strange nekonsekvencan uzon de la verbo *daŭrigi*—ni trovas jenajn formojn: *li daŭrigis sian parolon*, *li daŭrigis paroli*, *li daŭrigis*, *li daŭrigante parolis*, *daŭrigi rigardante*.

Kun forta bindaĵo, la aspekto de la libro estas plaĉa; troviĝas malmultaj preseraroj, sed en la ekzemplero recenzita, multaj literoj ne presiĝis, kio kaŭzis ĝenon dum la legado. La prezo estas iom alta, tamen mi aĉetis librojn sampezajn, kiuj valoris multe malpli, ol ĉi tiu. Mi taksas ĝin valora aldonaĵo al nia originala literaturo, kaj tre rekomendinda por tiuj, kiuj estas pretaj legi libron ne nur interesan, sed ankaŭ altgrade pensigan.

John S. Dinwoodie.

***English-Esperanto Dictionary:** Fulcher & Long: Eld. E.P.C. 18×13cm. 346 p. bind. prezo 13 ŝil., afranko 6p. Ofseta represo.

Ankoraŭfoje estas havebla la jam pruvita kaj altvalora vortaro Angla-Esperanta, kiu dum tiom da jaroj estas la fidinda konsultilo de la Angle parolantaj samideanoj. Kiel kutime ĉe la eldonaĵoj de E.P.C., la prestekniko kaj prezento estas modelaj kaj la papero bona. Ĉi tiu vortaro povus servi kiel modelo por la kompilo de vortaroj ĝenerale. La aranĝo faciligas la serĉadon de difinoj, kaj la multaj nuancoj de la Angla lingvo estas detale traktitaj. La fakto, ke nova eldono estas bezonata indikas la popularon de ĉi tiu bonega vortaro. La sola komento farebla eble estas, ke de kiam ĉi tiu vortaro estis kompilita, tre multaj vortoj enkondukiĝis en la ĉiutagan uzon kaj multaj vortoj tiutempe provaj jam trafis stabilon. Tion ĝustigos espereble baldaŭ eldonota reviziita vortaro.

M.S.

Propaganda poŝtkarto: U.E.A. pretigis propagandan dukoloran poŝtkarton (desegniton de H.C.O. Magel en Nederlando, al kiu U.E.A. direktas plej koran dankon). Ni sendas dek ekzemplerojn¹ al ĉiu petinto, kiu sendas al la Centra Oficejo poŝtan respondkuponon por afranko kaj servokuponon por indiki membrecon. Mendu tuj!

INTERNACIA KONKURSO 1949

Stato je la 31-a de Decembro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	3590	224.4
2. Islando ..	500	660	132.0
3. Svedujo ..	4100	5104	124.5
4. Norvegujo ..	1300	1544	118.7
5. Portugalujo	700	815	116.4
6. Belgujo ..	1700	1971	116.3
7. Polujo ..	4000	4650	116.2
8. Argentino ..	900	995	110.7
9. Germanujo ..	1600	1770	110.6
10. Brazilo ..	2000	2166	107.8
11. Usono ..	3000	3113	103.8
12. Urugvajo ..	250	255	102.0
13. Nov-Zelando	900	899	99.9
14. Aŭstralio ..	950	945	99.5
15. Britujo ..	13000	12860	98.9
16. Svislando ..	1400	1355	96.8
17. Danujo ..	3200	3070	95.9
18. Nederlando	5400	5042	93.4
19. Italujo ..	1600	1425	89.0
20. Finnlando ..	2000	1775	88.8
21. Francujo ..	6200	5165	83.3
22. Sud-Afriko ..	250	210	82.0
23. Ĉeĥoslovakujo	5300	4218	79.6
24. Kanado ..	300	230	76.6
25. Egiptujo ..	300	225	75.0
26. Hungarujo ..	1800	1330	73.9
27. Irlando ..	300	190	63.3
28. Austrujo ..	1000	600	60.0
29. Izraelo ..	400	240	60.0
29. Hispanujo ..	1200	540	45.0
30. Bulgarujo ..	1600	310	19.4

Multaj legantoj diverstempe esprimis sian malŝaton pri tabeloj kaj statistikoj. Kiu tamen volos dediĉi kelkajn momentojn al pristudo de la jena afero, ricevos netan bildon de la fluoj kaj tendencoj en nia movado. La tabelo ĉi tie prezentata havas la karakteron de hospitala ĉarto, indikanta la sanstaton de la pacientoj. Per ĝi ni tamen povas kontroli la staton de pluraj *kazoj*, kaj eble la plej frapa konstato estas la senprecedenca progreso de Jugoslavujo. Detala kaj inspira priskribo pri tiu fenomeno troviĝas sur p. 20 kaj ĉi tie ni volas limigi nin al esprimo de plej sinceraj laŭdo kaj gratulo al la gesamideanoj en tiu lando, kiuj ebligis tiun rimarkindan rezulton.

Dua konstato, inda je atento, estas la granda nombro da landoj—preskaŭ duono de la tuto—kiuj superis 100%! Ankaŭ al ili direktiĝas niaj gratuloj kaj danko!

En iuj landoj la spiriton de amika konkurenco, ligitan kun forta deziro praktike antaŭenigi nian aferon, oni vere kulturis kaj flegis, kaj oni jam esprimis deziron, ke en 1950 okazu simila konkurso. Ni do ĝojas anonci novan

Internacian Konkursan 1950

kaj ĉi-sube publikigas liston de kvotoj, la bazo de la kalkulado. La aljuĝo de poentoj okazas kiel en 1949—AM 1, MJ 5, MA 10, MS 15, Patrono 50,

nova DM 50. Al la Landa Asocio en la lando kiu montros la plej bonan progreson surbaze de la kvotoj, U.E.A. donos premion £10 (122 svisajn frankojn) kaj ĉiu Delegito en la koncerna lando ricevos libro-premion! Do al la laboro! Jen okazo por tiuj, kiuj ne sukcesis en 1949!

Kvotoj 1950

Argentino ..	1000	Irlando ..	250
Aŭstralio ..	900	Islando ..	660
Aŭstrujo ..	700	Italujo ..	1450
Belgujo ..	2000	Izraelo ..	250
Brazilo ..	2200	Jugoslavujo ..	3600
Britujo ..	12500	Kanado ..	250
Bulgarujo ..	1300	Nederlando ..	5100
Ĉeĥoslovakujo ..	4200	Norvegujo ..	1500
Danujo ..	3100	Nov-Zelando ..	850
Egiptujo ..	250	Pollando ..	4650
Finnlando ..	1800	Sud-Afriko ..	250
Francujo ..	5200	Svedlando ..	4900
Germanujo ..	2000	Svislando ..	1300
Hispanujo ..	600	Urugvajo ..	250
Hungarujo ..	1400	Usono ..	3100

Dumviva Membreco

Unu atentinda sekvo de nia Internacia Konkurso 1949 estis aliĝo de pluraj Dumvivaj Membroj. Tute aparte de la valora kontribuo de po 50 poentoj al la landa cifero, la Dumviva Membreco estas pripensinda afero por ĉiu Esperantisto. Ni permesas al ni prezenti ĉi tie la avantaĝojn de tiu kategorio de membreco.

Tre multaj Dumvivaj Membroj loĝantaj en landoj el kiuj nun ne eblas fari transpagojn pro financaj dekretoj, benas la tagon en kiu ili faris la decidon tiel aliĝi al nia Asocio. Ĉiam akurate, regule kaj seninterrompe la eldonaĵoj de la Asocio atingas ilin. Kiu el ni povas esti certa, ke post—ni diru—5 jaroj, ni povos same facile kaj libere, kiel nun, pagi nian kotizon al U.E.A.?

En la nuna epoko neniu povas rigardi en la estontecon kaj diri kun certo, ke la propraj ekonomiaj cirkonstancoj estos same bonaj, kiel hodiaŭ. Aliĝo kiel Dumviva Membro (kotizo=20-jaran MA-kotizon—Britoj £12-10-0) do estas prudenta antaŭzorgo kontraŭ la efemeraj kaj ŝanĝiĝemaj petolaĵoj de la vivo. Ĝi garantias al la aliĝinto **por la tuta vivo** la privilegiojn kaj rajtojn de abonanta membro. Utilas pensi ankaŭ pri la tempo, kiam oni pensiĝos, kaj la enspezoj eble iom malpligrandiĝos.

Kion signifas Dumviva Membreco por la Asocio?

Unue, la ekzisto de granda nombro de DM faciligas la administradon. La ĉiujaraj enskriboj de kotizoj, la translokaĵo de membrolistoj kaj adreskliŝoj el la "Nepaginta" fako en la "Paginta" fakon, la ĉiujara "memorigo" al forgesemaj samideanoj, ĉio tio estas simpligita ĝis nura rutino.

Grava punkto, kiun konsideru bone, estas tio, ke la DM-kotizoj estas enskribataj **en la Kapitalan Konton** de la Asocio. Tiaj pagoj faras konkretan kaj objektivan kontribuon al la konstanta bonhavo de la Asocio, plifirmigante la solidan bazon sur kiu nia organizaĵo estas konstruita. En la nuna momento la plej granda unuopa financa ŝarĝo de la Asocio estas la hipoteko pri la Esperanto-domo en Rickmansworth. Per ne tre grandnombra aliĝo de Dumvivaj Membroj, tiu ŝuldo povus esti nuligata, kaj la procentaĵoj nun pagataj povus esti direktataj en, por ni, pli utilajn kanalojn.

Krom la materialaj bonoj kaj avantaĝoj, tuj evidentaj, la ekzisto de solida kerno de Dumvivaj Membroj donas fortan moralan apogon al ĉiuj, kiuj laboras por nia afero. Tiu kerno staras kiel konstanta, kristaliĝinta esprimo de fido, rolanta kiel inspirilo de fervoro kaj entuziasmo, kvazaŭ flago en batalo. Ĝi estas signo de nia daŭreco, de nia decidemo pri la fina venko de nia idealo.

Neologismoj kaj Homaranismo (letero de J. Saldanha Carreira)

Mi legis la artikolon de Mason Stuttard en la decembra *Esperanto* kaj mi konfesas, ke li parte pravas. Arego da neologismoj igos Esperanton tro peza. Ili devas eniri la lingvon gutgute, elektitaj de kompetentuloj kaj kontrolitaj de la Akademio. Cetere, la Esperanta publiko estas jam sufiĉe multenombra kaj lerta por elekti el la aperintaj verkaĵoj la preferindajn al sia komprenemo, kaj kritiki, kondamni kaj forĵeti tiujn, kiuj balastos la lingvon.

Kompreneble ni devas iom post iom kompletigi la Esperantan vorttrezoron precipe en multaj teknikaj sektoroj, kie mankas elementoj nepre akirendaj. Tio formas la diversajn slangojn de nia Esperanto, uzatajn de la respektivaj fakanoj. Mi estas portugalo, mi parolas flue mian lingvon—mian nacian lingvon—tamen mi ne scias la grandan plimulton el tiuj vortoj de la diversaj metioj. Mi, bankoficisto, uzas alian slangon ol tiujn de miaj amikoj, la gravuristo kaj la elektristo. Tiuj vortoj, kiuj perverbe vivas en nia Esperanto, la aliaj, kiuj ankoraŭ mankas al ĝi kaj la novaj, kiujn la progreso nin montros, ne estas por mi neologismoj, sed teknikaj vortoj, tute objektivaj elementoj de la popola lingvo, elementoj nepre necesaj al la popola Esperanto.

Kiaj tamen estas la iloj de la literaturistoj? La skribilo kaj la fantazio, kiuj servas ilian belan subjektivan laboron. Kaj tiun fantazion mi opinias danĝera al la Esperanta vortaro se la verkisto, la poeto, la fantaziulo, estas nekompetenta kaj, por venki personajn malfacilaĵojn, ne zorgas la konforman terminaron kaj

trouzas kaj fuŝas neologismojn. Tiam okazos *preskaŭ* kiel diras Mason Stuttard "Esperanto estus la plej riĉa lingvo en la mondo, sed ne utilis kiel internacia lingvo." Notu, ke mi diris *preskaŭ*, ĉar ni ankaŭ devas pensi, ke Esperanto havas ĉiam siajn neŝanĝeblajn regulojn; la gramatiko estas la logika sintezo de ĉiuj gramatikoj kaj krom tio la nombro de la neologismoj neniam estus tiel granda, ke la tekstoj fariĝus nekompreneblaj. Nia Esperanto estas tiel mirinda, ke ni ofte ricevas skribaĵojn de komencantoj kaj nekulturitoj kaj ni tute komprenas ilian sencon tra la labirinto de eraroj. Mi pensas, ke tiuvoje miaj konkludoj tre alproksimiĝas al tiuj de Mason Stuttard.

Esperanto kaj Homaranismo vole nevole estas ĝemelaj fratoj. Kiam Zamenhof naskis Esperanton li antaŭvidis, ke lia filo apartenos pli al la popolo ol al la altgradaj kulturitoj, pli al la elementaj lernejoj ol al la universitatoj, pli al la popolamasoj ol al la patriciaj malplimultoj. Al la lingvo Esperanto tuj iras nia tuta simpatio; al la homarisma Esperanto flugas nia tuta amo, niaj pacemaj ambicioj, pacigaj deziroj, streĉa volo al tutmonda kunfratiĝo.

Esperanto apartenas al ĉiuj, sed estas pli utila al la popolo. Tiuj el la elito egoisme povas ignori ĝin ĉar ili uzas aliajn lingvojn, kiuj pli malpli konforme servas iliajn interesojn kaj konvenojn. En kelkaj landoj la respektivaj altaj instancoj kondamnas Esperanton pro tio, ke ĝi estas facila lingvo tute nekonvena al la kulturigo de la popolo. Ili ne persekutas la anglan kaj francan, ĉar tiuj, pro sia malfacileco, estas pli malproksimaj de la popolo, ne favoras la ĝeneralan kunfratiĝon, sed kontraŭe markas danĝerajn naciismojn. Kontraŭstarante nian Esperanton, ili omaĝe agnoskas la mirindajn kvalitojn t.e. la popolajn kvalitojn de la lingvo. En mia plej profunda emocio mi asertas, ke Esperanto ja venkis, ĉar la popolo jam forte tenas ĝin.

Ĉu la multaj aŭtoroj de lingvoj internaciaj sentis la popolon kiam ili laboris je siaj verkoj? Eĉ Michaux, la animo de la Unua Universala Kongreso poste anstataŭigis Esperanton per sia *Romanal*, pensante laŭ politika vidpunkto purigi artefaritan lingvon je malamikaj germanismoj.

Jes ja, S-ro Stuttard pravas kiam li diras, ke la "progresigo de nia afero ne estas speciala privilegio de ia elito". Sed mi rajtas demandi, en la nuna stato de la internacia egoismo: Al kiu utilas Esperanto? Ĉu al la popola klaso aŭ al la ceteraj?

Jes, Esperanto estas popola movado. **La popolo diktas la iradon!**

(**Nota de la redakcio:** Sekve de la artikoloj pri neologismoj, venis en la oficejon pli da korespondataĵoj ol pri iu ajn alia temo dum la jaro. Multaj estis tute subjektivaj kaj nenion aldonis al la temo. Iuj estis eĉ personaj. Ni opinias, ke ni donis sufiĉe da spaco al tiu afero, kaj ne publikigos novajn leterojn aŭ artikolojn pri tiu temo).

K. Wilgenhof :

LIBROJ EN KAJ EKSTER ESPERANTO

“Neniam mi vidis Esperanto-librojn en librovendejoj, kun escepto de kelkaj lernolibretoj,” iu diris al mi. “Vi Esperantistoj malfacile venkos la publikon pri la gravo kaj grandeco de la Esperanto-literaturo se ĝi ne vidas la verkojn multenombro sur la montobretoj de la butikoj.”

Kion respondi? Unue, la nuna sistemo de librovendado interne de la movado estas finance pli profita por la Esperanto-eldonejoj kaj sekve por la movado. Due, postmilitaj limigoj de transpagoj inter ŝtatoj tre ĝenas nian librokomercon. Tiu respondo tamen verŝajne ne konvertos la eksteran praktikulon al favoro por Esperanto.

Imagu tamen, ke niaj libroj troviĝus en ĉiuj librobutikoj. Oni povas sin demandi, ĉu ili ne farus impreson de negravo inter la nacilingvaj libroj, almenaŭ en pluraj landoj? Ekster la landoj de niaj fervoraj propagandistoj, oni plendas pri la aspekto de eteco koncerne Esperantajn librojn.* Propagandemaj Esperantistoj parolas kun fiero pri la Esperanto-literaturo, pri ĝiaj riĉoj kaj diversaj. Ili volonte sciigas, ke kelkmil verkoj jam aperis en la lingvo internacia. Pli kritikemaj samideanoj vidas ankaŭ la multon da legolibroj

“por superaj kursoj” kaj librojn broŝuritajn kaj presitajn sur nebona papero, kiuj ofte difektiĝas post kelka uzado.

Miaopinie la afero indas esploron. Oni povus ekzemple kompili statistikon pri Esperanto-libroj klasigante ilin laŭ paĝnombro kaj bindo. Mi faris tion pri libroj, pri kiuj recenzoj aŭ mencioj aperis en la recenz-rubriko de *Esperanto Internacia* kaj *Esperanto* de januaro 1946 ĝis fino de 1949. Al tiu nombro estas aldonitaj 13 kromtrovitaj en aliaj gazetoj proksimume el la sama periodo. Sendube eldoniĝis ankoraŭ kelkaj, kies titoloj ne aperis en la esploritaj recenz-rubrikoj, sed estas kredeble, ke tiuj apartenas al la malpli gravaj, kaj ke ilia nombro estas malgranda. Krome, la nombro de libroj pri kiuj la paĝnombro ne estis indikita—14—ne multe influas la rezulton, ĉar ili evidente plejmulte apartenas al la malgrandaj libroj, do al la plej granda grupo de Tabelo I. Mi tial supozas, ke mia malgranda statistiko estas sufiĉe preciza. Kalkulitaj estas libroj verkitaj nur en Esperanto, do ne dulingvaj lernolibroj kaj vortaroj. Mi rezignis ankaŭ pri prospektoj, broŝuretoj, poŝkalendaroj kaj tekstkajeroj de filmstrioj.

Tabelo I

paĝnombro	n-ro da libroj	procento	bind/karton-itaj
. . . . 49	49	45.4	1
50 99	39	36.1	3
100 199	12	11.1	5
200 299	3	2.8	1
300 399	3	2.8	3
400	2	1.8	2
	108	100	15=13.9%

Por ekscii ĝis kia grado Esperanto-libroj penetris en diversajn kampojn de homaj sciado kaj agado ni povas facile fiksi procentojn el la nun haveblaj verkoj, kies titoloj aperis en la lasta jarlibro de U.E.A. Ankaŭ tiel nia kalkulado ne trafas ĉiujn librojn nun aĉeteblajn, sed ankaŭ en ĉi tiu kazo ni povas rigardi la trovitajn nombrojn, kiel sufiĉan proksimiĝon al la reala stato.

El la unua tabelo evidentiĝas, ke proksimume 80% de la Esperantaj libroj, kiuj aperis dum la lastaj jaroj, havas malpli ol cent paĝojn. Krom tio, preskaŭ neniuj el ili estas binditaj aŭ kartonitaj. Ni povas nomi ilin nur libretoj.

* Vathis, Wm. P. *Ni plibonigu niajn librojn, Esperanto* p. 127 okt. 1948.

Ĉe la dua tabelo mi faris triklasan dividon: Esperantismaj (A—15%), Literaturaj (B—64%), kaj Fakaj verkoj (C—21%).

Ni rigardu la procentojn laŭ la vidpunkto de neesperantisto, kiu konsideras, ĉu lerno de Esperanto povos utili al liaj bezonoj de pliklerigo per libroj en la internacia lingvo. Grupo A ne multe valoras por li. Li ne deziras scion pri, sed per Esperanto. La dua grupo estas pli valora por tiu, kiu deziras koni verkojn beletrajn kaj distrajn. Sed la studento en iu branĉo de scienco aŭ tekniko trovas nur malmulton en grupo C ĉar el la dua tabelo montriĝas, ke tiom gravaj fakoj, kiom la fiziko, la kemio, la mekaniko, la komerco, la psikologio k.a. apenaŭ trovis lokon en la hodiaŭa Esperanto-libraro.

A
B
C
Saj
Esper
povis
mank
Mi
ol la
pova
grava
Prav
kaj b
volor
nees
litera
fortil
temo
La
ĉiuta
recen
La re
legan
libro
lingv
cento
Kv
malg
komp
la lin
dezir
kelka
preze
temo
400
listoj
fakoj
biolo
E
Revuo

Tabelo II

A lernolibroj (Esperantaj) vortaroj (Esperantaj) movado	8 9 26	43	14.9%
B proza literaturo poezia literaturo	154 30	184	63.7%
C religio, filozofio sociologio, politiko geografio, vojaĝado arto, komerco, scienco, tekniko kantoj diversaj	15 10 8 17 10 2	62	21.4%
	289	289	100%

Sajnas, ke la antaŭmilita produktado de Esperanto-libroj estis pli bona, kvankam mi ne povis konfirmi tion per nombroj, ĉar al mi mankas materialo.

Mi konscias, ke mi ĵus konsideris pli la kvanton, ol la kvalitan flankon de nia literaturo. Oni povas diri, ke la enhavo de libro estas multe pli grava ol ĝiaj amplekso kaj ekstera aspekto. Prave. Inter la libretoj troviĝas pluraj tre gravaj kaj bonkvalitaj. Mi posedas kelkajn el ili kaj ne volonte malhavus ilin. Ni tamen pripensu, ke la neesperantista publiko respektos nur Esperantan literaturon, kiu generas sufiĉe da ampleksaj, fortikaj kaj belaspektaj volumoj pri ĉiaj gravaj temoj, kiel okazas en grandnaciaj lingvoj.*

La ĵurnalo, kiun mi ricevadas, enhavas preskaŭ ĉiutage recenzon pri iu libro. Tio signifas recenzojn pri proksimume 300 libroj dum jaro. La redakcio iniciatis tiun rubrikon por doni al sia legantaro almenaŭ iom da informoj pri novaj libroj, do oni facile konstatas, ke en mia nacia lingvo—meze grava—certe aperas centoj kaj centoj da libroj ĉiujare.

Kvankam multaj bonaj libroj—ankaŭ inter la malgrandaj—aperis en Esperanto, post tia komparo kun nacilingvo ni denova klare vidas ke la lingvo internacia estas ankoraŭ malproksima de dezirinda stato. Apud mi kuŝas katalogoj de kelkaj gravaj Novjorkaj eldonfirmoj. Ĉiu el ili prezentas centojn da titoloj. La nombro da temoj estas granda. Multaj libroj nombras 300, 400 ĝis 500 paĝojn. Foliumentante ĉi tiujn librolistojn oni povas trovi plurajn verkojn en ĉiu el la fakoj: aeronautiko, agrikulturo, aŭto-mekaniko, biologio, komerco, ekonomio, kemio kaj

* Einar Hult, *Kiel hreskigi la legemon? Malgranda Revuo 7, n-ro 3: 27, 1949.*

kemitekniko, mekaniko, metalurgio, fiziko, politikaj sciencoj, psika sinevoluigo, sociologio, k.s. Ĉia studento povas kontentigi sian lernavidon. Unu el la eldonistoj aperigis tutan serion konsistantan el 27 volumoj nur pri la moderna temo *radar* (radilokalizo) kun paĝnombro varianta inter 375 kaj 935!

Inter ni ofte estas asertate, ke la angla lingvo, kiel internacia, estigus nedezirindan neegalecon inter anglalingvanoj kaj alilingvanoj. Tio estas vera. Tamen la fakisto, kiu deziras aŭ estas devigata, ke lia scio estu ĝisdata, ofte devas sin turni al la angla, cedante antaŭ la maloportuneco de tiu lingvo, ankaŭ kiel nura legolingvo.*

Ankaŭ laikoj, kiuj emas al ĝenerala plikeriĝo, ne tro profunden penetrante en specialistajn fakdemandojn, ofte trovas en sia propra lingvo, aŭ alia, ampleksan verkaron diversan kaj modernan pri ĉiaj temoj kaj de aŭtoroj kompetentaj en sia fako. Tiam verkaron la Esperantismo ankoraŭ ne prezentis al la tutmonda libroliganta publiko kaj ankoraŭ ne povas prezenti. Sciŝ tion estas gajno. Tia komparo povas pliklarigi al ni, kio estas dezirinda kaj kio estas ebla en la Esperantlibra sektoro. Pesante la eblojn kontraŭ la dezirindaĵoj, niaj eldonistoj faru siajn planojn. Ju pli vasta kaj ju pli klara la kompreno pri la libro-merkato, des pli grandaj la ŝancoj de sukceso.

* Semmelink J.: *Internacia Lingvo, Ĉu Esperanto?* *Esperanto* 525/6 p. 86, 1949.

Kongreso en Nederlando

Kongreso de L.E.E.N. okazos en Groningen 8, 9, 10 de Aprilo. Oni sin turnu al F-ino J. Le Rutte, Prinsesseweg 58, Groningen, Nederlando por informoj.

Eminentaj patronoj por la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno

Responde al invitoj apogi la laboron de la I.E.M. en Vieno, la prezidanto de la Muzeo, S-ro Hugo Steiner ricevis la jenajn leterojn (en traduko) : de D-ro Ing. Figl, Aŭstra Kanceliero :
Tre estimata sinjoro Kortega Konsilisto,

Plej kompleze dankante al Vi pro via letero de la 14-a de aŭgusto, mi informas Vin, ke mi plezure estas preta eniri la internacian honoran komitaton de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Kun esprimo de mia plej granda atestimo,

Figl,
 22.sept.1949.

De la Instrumministro, D-ro Felix Hurdes :
Estimata sinjoro Kortega Konsilisto,

Kun granda ĝojo mi akceptas la direktitan al mi honorigan inviton je eniro en la Honora Komitato de Internacia Esperanto-Muzeo. Mi plezure pretas sekvi ĉi tiun al mi direktitan inviton kaj per tio konfirmi ankaŭ antaŭ la pli vasta publiko mian interligitecon kun la belaj taskoj de Via instituto.

Kun la plej bonaj deziroj por la estonta prospera evoluo de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien mi restas kun la esprimo de mia plej granda altrespekto.

Hurdes,
 Wien 26.okt.1949.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien

La Muzeo estis fondata en 1927 kaj estas la propraĵo de la Esperantistaro de la tuta mondo. Per kontrakto kun la instrumisterio la muzeo estas envicigita kiel aparta kolekto en la mondfama Nacia Biblioteko en Wien, kiu havas la devon konservi la kolektaĵon kaj ĝin disponigi al la uzado de la publiko. La fondinto estas la honora direktoro de la kolekto dum 22 jaroj, S-ro Kortega Konsilisto Hugo Steiner.

IEMW kolektas ĉiajn Esperantaĵojn, precipe librojn, broŝurojn, oficialajn dokumentojn (ankaŭ kopiojn), kongresaĵojn, afiŝojn, cirkulerojn, varbilojn, gvidilojn k.s. Samideanoj do nenion forjetu, sed sendu ĝin al la Muzeo.

Laŭ la kontrakto kun la instrumisterio la ŝtato disponigis por la Muzeo 4 salonegojn en Hofburg, la iama imperiestra kastelo en la mezo de la urbeĝo, kaj donas oficmaterialon. Ĝi tamen ankoraŭ ne povas doni monsubvencion por pagi dungitojn kaj tial oni petas la malavaran helpon de samideanoj en la tuta mondo.

Oni povas fariĝi membro de IEMW laŭ kategorioj dumviva pagante unufojan kotizon de 25 int. resp. kuponoj, aŭ subtenanto pagante ĉiujare almenaŭ 3 rpk.

La adreso de la Muzeo estas : Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, Hofburg, Batthyanystrasse, WIEN 1, Aŭstrujo.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Ciutage	14.45-15.00	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I. Ĉeĥoslovaka Radio, Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	17.15-17.30	Paris. 48.82m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Elysées, Paris 8.
	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	05.30-05.35	Wien. 506m., 31m., 41m. I.
	07.15-07.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m. P. Sveriges Radio. Stockholm 7.
	15.15-15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	16.30-17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	21.45-22.00	Praha 470m., 325m., 259m.
Mardo	01.15-01.30	Sveda Radio. 49.46m. 27.83m.
	11.55-12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
Merkredo	13.20-13.35	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan merkredon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszvdowa 8.
	21.45-22.00	Praha kiel lunde.
	22.00-22.45	Praha II. 269m., 325m., 219m. Verda Stacio nur la unuan merkredon Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
Ĵaŭdo	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	22.00-22.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	08.05-08.20	Paris. 386m. K. (ĉiun duan vendredon de 10.II.50).
	14.30-14.45	Graz. 240m. K. Radio Graz, Esperanto-Voĉo, Zusertalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
	15.40-15.55	Wien. 228m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

dek
 Ni k
 ni ne j
 la naj
 pritrak
 indivic
 Ni l
 pri la
 celo k
 planto
 mente
 por ak
 ni nut
 vivi ni
 flegi la
 en la
 sintru
 grundo
 la tero
 tero.

Salu
 dum l
 kaj be
 respon
 nian
 persor
 saluto

KARTO DE NOVA TERO

deklaro de la organizaĵo *Homoj de la Arboj*

Ni kredas, ke sen honesta pritrakto pri la tero ni ne povas vivi fizike; sen honesta pritrakto pri la najbaro ni ne povas vivi socie; sen honesta pritrakto pri nia plibona memo ni ne povas vivi individue.

Ni kredas je la evoluo de pli vasta kompreno pri la vera rilato inter ĉiuj formoj de vivo kun la celo konservi naturan egalpezon inter mineraloj, plantoj, bestoj kaj la homo, ĉar la homo fundamente estas dependa de la kreskaĵoj sur la tero por akiri de nutraĵoj kaj vestoj. Por havigi al ni nutraĵon, vestojn kaj ŝirmon, kiuj ebligas al ni vivi nian enkorpan vivon sur ĉi tiu tero, ni devas flegi la teron, sed antaŭ ĉio ne malzorge nin trudi en la cirkuladon de akvo, ĉar tiu malprudenta sintrudo jam rezultigis grandajn perdojn de grundo ĉie sur la terglobo, kaj ni devas redoni al la tero la kromaĵon de ĉio, kion ni prenas de la tero.

Ni opinias, ke akvo estas baza prikonsiderindaĵo en ĉiuj niaj arbar-programoj, ĉu naciaj ĉu tutteraj; al riveretoj kaj riveroj devas esti redonataj iliaj naturaj fluoj kaj movoj, kaj superakviĝoj kaj sekperiodoj ĉesigataj. Arbaregoj kaj arbterenoj estas intime ligitaj kun biologia, socia kaj spirita bonfarto de la homo. Tra la tuta mondo la minimuma arbobezo por ĉiu naturdrena tereno estas 25%, kun konvena konsisto de diversaj specoj, inkluzive de larĝfoliaj arboj, ĉar ĉia unuspeca kulturo estas malutila al la tero.

Ni akceptas la tradician idealon, ke niaj kampoj estu *kampoj de la arbaroj* per kio, laŭ nia kompreno, okazas harmonia kulturo de ĉiu valo kaj stepo, kun arbaroj sur la altaĵoj, ŝirm-zonoj, frukt-arbaroj el interlokitaĵoj specoj, kaj heĝarboj ĉie.

*Kun afabla permeso de la fondinto,
'Men of the Trees',
The Gate, Abbotsbury, Dorset, Anglujo,
Tradukis M.S.*



Salutojn! Envenis en la Centran Oficejon dum la festa sezono tre multaj esprimoj de salutoj kaj bondeziroj, tro multaj por ebligi individuan respondon. Ni tial kaptas la okazon esprimi nian dankon al ĉiuj skribintoj kaj diri, ke la personaro tutkore kaj sincere reciprokas la salutojn esprimatajn.

Ĉu rekordo?

S-ro H. B. skribas por sciigi, ke en lia grupo (Leeds, Anglujo) troviĝas tri samideanoj, kiuj iris al la Pariza Kongreso en 1914. Krome li sciigas, ke kvin anoj de la grupo kalkulas inter si pli ol 200 jarojn da membreco de la sama grupo.

PRI "READERS' DIGEST"

Por tuj averti la leganton: ne temas pri *digest(ad)o* en la kutima senco, sed pri io alia, nome pri elekto aŭ kolekto de gazet- aŭ revu- artikoloj. La origina ideo de tiu ĉie konata formo de periodaĵo estis nenio alia ol *revuo pri revuoj*. Antaŭ kelkaj jardekoj ekaperis en Usono la ankoraŭ ekzistanta *Readers' Digest*, revuo por la rapidleganta usonano. Sed kia evoluo dum tri jardekoj! Vivante en epoko de specialigo, ankaŭ la *Digest*-oj specialigis. Tiuj revuoj ne nur aperis en dudeko da lingvoj (*Selection, Selezione, Die Auslese, Das Beste* k.t.p., k.t.p.) sed la konkurenco trovis alian terenon, tiun de specialigo. La tempo, kiam oni prezentis al rapidanta publiko bone elektitajn tekstojn el ĉiuj sferoj, jam apartenas al literatura diluvio. La progreso iras ankoraŭ pli rapide, kiel oni povas konstati ĉe modernaj kioskoj. La leganto estas servata laŭ sia plaĉo, kaj laŭ sia speciala fako per artikoloj ĉerpitaj el aliaj fontoj. La leganto ŝparas tempon, eĉ legante. Ke la saĝaj ĉinoj tiurilate demandas la eŭropanon: "sed kion vi faras per la tempo tiel gajnita?" ne estas afero de nia nuna temo, krom se iu pensas pri kreo de *Digest* kiu instruas pri ĉinaj spritaĵoj.

En Francujo la nova *Digest*-epoko estas ankoraŭ freŝdata. De la *Ciné-Digest*, kiu informas, kion ni devas scii pri Tyrone Power, kaj la naskiĝtagojn de iuj *steloj* en la kuranta monato, aperas ĝis nun jam kelkaj numeroj. Kiu interesiĝas pri la sporto, tiu povas konsulti la *Sport-Digest*. Apud ĝi oni trovas la *Katolika Digest*, kiu estas pruvo pri la modernigo de la eklezia propagando. Certe ne estis en la intenco de la eldonistoj de tiu religia revuo, ke ĝi estu proponata al scivolemuloj kune kun aliaj, tre malekleziaj, legaĵoj, ekzemple la *Amour-Digest*! Tiukaze la vorto *Digest* estas nura reklamilo. La artikoloj ne estas jam aperintaj en alia periodaĵo. Ĉiuj knabinoj, kiujn oni vidas en *Amour-Digest* kompreneble estas mirindaj, la junuloj plenfortaj kaj grandanimaj, kun escepto de iuj krimuloj, baldaŭ atingotaj de la brako de la justeco—la sola, kiu ne ĉirkaŭpremas ameme! Mallonge, ĉi tiuj rakontoj ne povus aperi aliloke! Verkistinoj de sentimentaj societromanaj en familiaj revuoj estas klasikaj verkistinoj kompare kun la aŭtoroj de ĉi tiu *Amour-Digest* (eldonnumero 250.000!).

Tamen ĝin superas *Sex-Digest* kun subtitolo *Digest Sexual et Social*. La *socian* parton oni vane serĉas. Kontraŭe, la leganto ekscias pri la incita influo de la ŝipveturado sur la amon, eĉ de la fervoj-veturado, de la kontraŭa influo de la aerveturado, pri la perverseco de Napoleono (kio troviĝas precize en tio, ke li estis tute normala), pri la amdoloroj de la legantinoj kaj legantoj,

kiujn oni invitas, ne havi skrupulojn, kaj fine pri la tute modernaj *flanksaltoj* en aŭtomobiloj. Fine en iu kajero troviĝas kvazaŭ la plej alta ŝtupo de specialigo. Temas pri la *Memoroj de la lasta eŭnuko*. Tio komenciĝas per la bela frazo: *La lasta eŭnuko ne skribis siajn memoraĵojn, sed diktis ilin al nia special-korespondanto* Sendube kun soprana voĉo kaj por centmiloj da legantoj. Ili espereble ne havu post tiu *Special-digest* maldigeston!

La sukceso de ĉi tiu revuo-formo (t.e. la ordinara *Readers' Digest* aperanta ĉiumonate en pli ol dudek landoj kaj lingvoj) montras kio estas farebla el ideo, kiu respondas al la bezono. Ne estas, ke la artikoloj aperantaj en ĉi tiuj *Digest*-oj estas multe pli altaj aŭ pli valoraj ol en aliaj revuoj. Ifoje ili eĉ estas sub la kutima nivelo! Estas la formato—18.5 × 13.5 cm. (7½ × 5½ coloj)—la maniero de prezento kaj la grandstila disvastigado, kiuj kondukis al ĉi tiu sukceso.

La specialigo de ĉi tiu tipo de revuo direktas la penson al tio, ĉu ne estus diskutinda temo, transformi nian revuon ESPERANTO—certe ne kun la vorto *Digest*, sed simple kun la vorto *Esperanto*. La Redaktoro kaj la Sekretario de U.E.A. samtempe pensis pri ĉi tiu afero kaj dum la kongreso en Bournemouth oni diskutis ĝin. Komisiono konsistanta el samideanoj Adamson, Walder kaj la redaktoro de *Esperanto* ekzamenis la *por* kaj *kontraŭ*, sed ne rekomendis ŝanĝon de la formato kaj aranĝo. Oni tamen konsciis, ke estus bone demandi la suverenon, t.e. la legantaron.

Ni submetas la ideon al la ekzameno de la legantoj kaj atendas la honon. Ne hezitu, sed diru vian opinion pri la dezirindeco de tiu formato, kaj sendu vian leteron al:

Hans Jakob,
Universala Esperanto-Asocio,
Palais Wilson, GENEVE, Svislando.

35-a Universala Kongreso de Esperanto Paris 5-12 aŭg. 1950 Statistiko

Ĝis 31-a de decembro 1949 aliĝis al la 35-a U.K. samideanoj laŭ la jena listo: Alĝerio 4, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 1, Belgujo 45, Brazilo 2, Britujo 264, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 7, Danujo 18, Egiptujo 1, Finnlando 9, Francujo 425, Germanujo 20, Hispanujo 4, Hungarujo 1, Irlando 2, Italujo 20, Izraelo 7, Jugoslavujo 4, Maroko 10, Nederlando 33, Norvegujo 6, Polujo 5, Portugalujo 1, Saarlando 2, Svedujo 75, Svislando 24, Tunizio 1, Usono 3. Entute 1000 el 30 landoj.

Iu k
malbela
adjekt
pri ĉi t
en Ma
tuŝis la
pli ĝe
supozi.

Pri l
longe
kaj in
nenion
de la e
Morto
majusl
aprobi
sekve
La ku
ambat
majusl
vera, s
pro sia
Ĉu l
de hor
sciis,
propra
jen la
lastaj
La E
Esper
Zamer
ne efe
laboro
sur te
sed n
eldiris
kutim
faris
serioz
sed l
aparte
fakto
minus
Kia
adjek
Oni p
respor
propt
kiam
nome
majus
havas
perfek
Tio
supoz

Mason Stuttard :

PRI MAJUSKLADO

Iu korespondanto antaŭ nelonge aludis pri mia *malbela, senutila kaj tute arkaika majusklado de adjektivoj*, kaj en kunveno en Londono la intereso pri ĉi temo estis surprize vigla. Stellan Engholm en *Malgranda Revuo*, kiel ankaŭ aliaj periodaĵoj, tuŝis la temon, kaj estas evidente, ke la afero havas pli ĝeneralan intereson, ol oni povus supraĵe supozi.

Pri la opinio de mia korespondanto ne necesas longe paroli. La verdikto estas tute subjektiva kaj informas nur pri privata starpunkto, sed nenion pri la faktoj. Por ilustrati la subjektivecon de la epiteto *malbela* mi menciis du recenzojn pri *Morto de Trajno*. Unu malaprobis la *anglian* majuskladon de propraj nomoj, dum la alia aprobis la "plaĉan variecon en la prestekniko sekve de la uzo de majuskloj laŭ la *angla* maniero." La kursivoj estas miaj, kaj mi volas emfazi, ke ambaŭ eraris en sia evidenta supozo, ke mi uzas majusklojn pro mia angleco. Tio estas tute ne vera, sed mi inklinas kredi, ke ne-angloj minusklas pro *sia* nacilingva uzo.

Ĉu la uzo estas arkaika? La granda plimulto de homoj kun kiuj mi diskutis ĉi tiun temon, ne sciis, ke Zamenhof komence uzis minusklojn ĉe propraj nomoj en adjektiva formo, sed ke—kaj jen la frapanta kaj ne ignorebla fakto—en siaj lastaj jaroj li komencis uzi la majusklon! (vidu *La Biblio* kaj *Fabeloj*). Neniu kompetenta Esperantisto volas nei, ke en la grandega verko de Zamenhof troviĝas multaj nekonskvencaĵoj, se ne efektivaj eraroj. Tio certe estis rezulto de troa laboro kaj pro la fakto, ke li laboris eksperimente sur tereno necerta kaj en afero ankoraŭ nestabila, sed neniu kuraĝus aserti, ke kiam Zamenhof eldiris opinion post konsidero aŭ sanĝis dumjaran kutimon (certe ankaŭ post zorga konsidero) li tion faris facilanime aŭ pro premo de okupoj. Ĉiu serioza Esperantisto atentus ĉion Zamenhofan, sed la *postpensoj* de Zamenhof meritas ilian aparte seriozan pripenson. Laŭ la nur kronologia fakto de Zamenhofa uzado, efektive la uzado de minuskloj estas arkaika! Ni tamen lasu tion.

Kian utilon havas la majusklo en propranoma adjektivo? Kial Zamenhof sanĝis sian kutimon? Oni povas nur konjekti (ĉar Zamenhof mem ne respondis la demandojn), ke li ekkomprenis, ke propranomeco kuŝas en la radiko mem! Sekve, kiam oni parolas pri la *Angla lingvo* la propranomeco estas konservebla kaj konservinda per la majusklo. Oni eble sin demandas, kian gravon havas tio? Eĉ dirante la *angla lingvo* oni perfekte sin komprenigas.

Tio kondukas nin al la kerno de la afero, kaj supozeble al la motivo de Zamenhof. Mi jam

citis en mia tiutempa letero al S. Engholm diversajn homonimojn, kiuj eĉ se ili ne kaŭzis rektan miskomprenon, tamen produktis nekonservan psikologian efekton kaj momentan embarason. Iuj kaŭzis nur amuzon. Kредu tamen, ke la ekzemploj ne estas konstruitaj por la argumento, sed fakte estas legitaj, ĉu en la Centra Oficejo de U.E.A., ĉu en periodaĵo.

La plej atentinda ekzemplo, kiun mi malkovris, troviĝis en la manuskripto de *Kudra kaj Trika Terminaro*, kiun mi kontrolis. Dum tre longa tempo mi kulturis ĉe mi la akcepton de la neologismo *angoro*, kiun niaj poetoj ofte uzas en siaj versaĵoj. La senco estas *spirita* doloro (Angle *anguish*). Mi jam al kutimiĝis al la *elvokiveco* (laŭ Kalocsay) de tiu vorto. Imagu mian momentan embarason, kaj mian postan egan amuzon legante, ke iu ŝtofo estas farita el *la lano de angora kapro!* Mi bildigis al mi solecan longabarban kapron vagantan senkonsole sur la malvarmaj, sensirmaj krutaĵoj de la montoj, eble funebrantan la perdon de kara kamarado glitfalinta en abismon. Aŭ eble li travivas taŭzantan kordoloron pro nefidela amatino forlogita de alia kapro kun pli longaj kornoj, pli delikata barbo...! Estu kiel ajn, S-ro Vilĉjo Verda difinis, ke por fari iun ŝtofon, oni devas detondi de li lian lanon. Kompatinda kapro! Kiam pli li estos angora, kiam oni forrabis de li lian surtuton! (V.V. poste uzis majusklon).

La neta rezulto estas, ke ĉiufoje kiam mi nun legas versaĵon kiu enhavas *angoro* mi tuj pensas pri... kaproj!

Jen ankoraŭ kelkaj: li pasie kisi la *sardinon*; li portis rondan *kuban* ĉapelon; ni ricevis donace *maltan* vinon; ŝi apartenis al *sudana* gento; li parolis *senegale*; al nia *kanaria* amiko; la *privata* verko. Samideanoj certe konas multajn similajn.

S. Engholm faris tre trafan kritikon pri la uzo de majuskloj atentigante, ke en la parolo estas neeble indiki ĝin, kial do fari distingon en la skribo? Laŭ inversa argumentado, oni povus atentigi ke preleganto multege kontribuas al la parolo per diversaj rimedoj—levo de la ŝultroj, gestoj, okulumado, voĉmalaltigo kaj aliaj variigoj de la tono k.s.—kiujn absolute neblas enkonduki en la skribo. Ĉu do ni rezignu pri tiuj rimedoj en la parolo?

La plej valida argumento kontraŭ la Engholma atentigo estas, ke se oni devas rezigni pri majuskloj en la skribo pro rezigno pri ili en parolo, kial uzi majusklojn entute? Kial ne simple skribi ekzemple *stellan engholm*, *hagge*, *svedujo*?

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 223

2-an de Januaro 1950

NOVAJ DELEGITOJ

Belgujo

Bruxelles. FD (Ekonomio politika) : F. Swinne, 77 rue de Nieuwenhove, Uccle.

FD (Instruado) : F-ino S. Obozinski, 364 Avenue Brugmann, Uccle.

Gent. FD (Komerco) : S-ino A. Gruslet, 40 Meerschstraat.

Britujo

Derby. D : F. J. Rogers, 162 Kingsway.

Hexham. D : J. Brownlee, 8 Westbourne Grove. Tel : 35.

FD (Gasindustrio) : La D.

Luton. FD (Farmacio) : G. N. Shelton, 81 Cutenhoe Road. Tel : 644.

Pickering (Yorks). D : S. Curran, 17 Castlegate. Tel : 29.

Ĉeĥoslovakujo

Běhánky-Teplice. D : B. Guttman, Běhánky-Teplice 142.

Praha. FD (Radio) : A. Slanina, Nádražní 13, Praha XVI. Tel : 491-13.

Finnlando

Leppäkoski. D : Fr. E. Heikkinen, Tauntala.

Vaasa. FD (Stenografio) : E. Mansikka, Raastuvankatu 55.

FD (Virinaj aferoj) : F-ino H. Nori, Palosaarentie 90.

Hispanujo

Barcelona. FD (Transporto-fervoja) : S. Alberich-Jofrè, Major de Gràcia 183, 3-er. Tel : 13186.

San Sebastián. D : F. Mugica, San Juan 5. Tel : 17563.

Hungarujo

Vasvár. D : D-ro J. Kondor, Petöfi u. 46.

Jugoslavujo

Cavtat. D : M. Solovjev, kuća na Ratu, Cavtat, Dalmacija.

Ljubljana. FD (Aŭtomobiloj) : B. Brezovsek, Stepanska c. 8.

Usono

Detroit (Mich.). D : O. Poehlmann, 2016 W. Alexandrine Ave., Detroit 8.

ŜANĜOJ

Britujo

Barry. VD : nova adreso : 335 Barry Road West.

Danlando

Gentoft. D. kaj FD (Muziko) : nova adreso : Fugle-gaardsvaenget 84.

Finnlando

Vainikkala. D : vakas.

Italujo

Roma. FD (Filatelo) : nova adreso : Casella Postale 327 A.D.

Jugoslavujo

Ljubljana. VD : nova adreso : Soteska 8.

Pollando

Radom. FD (Koopertivismo) : vakas.

Warszawa. FD (Hebreaj aferoj) : vakas.

Svedujo

Stockholm. FD (Filatelo) : vakas.

Usono

Los Angeles (Calif.). VD : nova adreso : 1237 N. Alexandria Avenue, Los Angeles 29.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ro M. Fernández, Montevideo, Urugvajo.

F-ino E. C. Smith, London, Anglujo.

S-ro M. Potts, Wellington, Nov-Zelando.

S-ro F. Buckley, Bristol, Anglujo.

S-ro T. Raimar, Nordbyneset, Norvegujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

366. S-ro B. Szychulski, Poznań, Pollando.

PATRONOJ 1950

1. Williams, D-ro F. J., Melbourne, Aŭstralio.

2. Van der Lijn, S-ro G., Uccle, Belgujo.

3. Wooding, S-ro N., Leicester, Anglujo.

4. Crowley, D-ro R. H., Tewin, Anglujo.

5. Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Anglujo.

6. Gueritte, S-ro T. J., Surbiton, Anglujo.

7. Jervis, S-ro R. F., Slough, Anglujo.

8. Kennedy, S-ro D., Glasgow, Skotlando.

9. Ford, S-ro J. L., London, Anglujo.

10. Murray, S-ro J. H., Dearborn, Mich., Usono.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950

1. Serra, S-ro P., Aveiro, Portugalujo.

2. Lopes do Rego, S-ro M., Lisboa, Portugalujo.

3. Bernaldo, S-ro L., Lisboa, Portugalujo.

4. Bluett, S-ro T. L. C., Penzance, Anglujo.

5. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Anglujo.

6. Parker, S-ro G. H., London, Anglujo.

7. Thurgood, S-ro F., London, Anglujo.

8. Blöndal, S-ro B. P., Hvammstanga, Islando.

9. Jost, S-ro K., Zürich, Svislando.

10. Le Brun, S-ro P., Kreuzlingen, Svislando.

11. Monod, F-ino H., Morges, Svislando.

12. Schweizer, S-ro A., Zürich, Svislando.

13. Baur, D-ro A., Bern, Svislando.

14. Flugel, Prof. J. C., London, Anglujo.

15. Sturge, F-ino S. M., Birmingham, Anglujo.

16. Jayne, S-ro E. K., Croydon, Anglujo.

17. Fortey, F-ino I. C., Leicester, Anglujo.

18. Cooper, S-ino H. V., Bromley, Anglujo.

19. Daly, F-ino E. de B., Okehampton, Anglujo.

20. Fisher, S-ro A., Parkstone, Anglujo.

21. Fotherby, F-ino A., Surbiton, Anglujo.

22. Hattersley, S-ro C. M., Mexborough, Anglujo.

23. Holmes, S-ro H. W., London, Anglujo.

24. Holmes, S-ino N., London, Anglujo.

25. Jay, F-ino M., Bishop Auckland, Anglujo.

26. Keiller, S-ro G. W., London, Anglujo.

27. Larking, S-ro S. H., London, Anglujo.

28. Miller, S-ro J. R., Stone, Anglujo.

29. Phelan, S-ro H. K., London, Anglujo.

30. Shaw, S-ro F. W., Whitworth, Anglujo.

31. de Vere, S-ino H., Wrotham, Anglujo.

32. Glennie, F-ino C. M., London, Anglujo.

33. Alexander, S-ro K., New Malden, Anglujo.

34. Deane, F-ino L. M., Broadstone, Anglujo.

35. Gillett, S-ro R. B., Andover, Anglujo.

36. Luty, F-ino M., Halifax, Anglujo.

37. M
38. I
39. I
40. 7
41. I
42. S
43. I
44. I
45. I
46. I
47. I
48. I
49. I
50. I
51. I
52. I
53. I
54. I
55. I
56. I
57. I
58. I
59. I
60. I
61. I
62. I
63. I
64. I
65. I
66. I
67. I
68. I
69. I
70. I
71. I
72. I
73. I
74. I
75. I
76. I
77. I
78. I
79. I
80. I

37. Millidge, S-ro R. G., Sutton, Anglujo.
38. Riding, F-ino E., Herne Bay, Anglujo.
39. Roome, S-ro G. W., Sheffield, Anglujo.
40. Young, S-ro K. J., North Cheam, Anglujo
41. Miskimmon, S-ro W. A., Hamilton, Skotlando.
42. Schofield, S-ro B. S., Bury, Anglujo.
43. Prince, S-ro A., Letchworth, Anglujo.
44. Anderson, S-ro B. E. S., Danbury, Anglujo
45. Baillie, S-ro T. C., Worksop, Anglujo.
46. Beaumont, S-ro B. B., Huddersfield, Anglujo.
47. Boatman, S-ro D. P., Westcliff, Anglujo.
48. Dunbar, S-ro R., London, Anglujo.
49. Goodfellow, S-ino V., Whitburn, Anglujo.
50. Kennedy, S-ro R., Glasgow, Skotlando.
51. Pearson, F-ino E. M., York, Anglujo.
52. Ryan, S-ro H., West Wickham, Anglujo.
53. Squire, F-ino E., West Hartlepool, Anglujo.
54. Boscarino, S-ro G. S., Ragusa, Italujo.
55. Baker, S-ro C. A., Exeter, Anglujo.
56. Hilder, S-ro E. C. London, Anglujo.
57. Poultney S-ro D. A., Bognor Regis, Anglujo.
58. Sly, S-ro K. A., Slough, Anglujo.
59. Hill, S-ino D. W., Brighton, Anglujo.
60. Ison, F-ino H. M., Colchester, Anglujo.
61. Lindmark, Sam-ino E., Uppsala, Svedujo.
62. Fejde, S-ro M. Nässjö, Svedujo.
63. Orwehand, S-ro D., Den Haag, Nederlando.
64. Amelin, S-ino H., London, Anglujo.
65. Preedy, S-ro G. L., Cirencester, Anglujo.
66. Ashby, F-ino E. A., Newquay, Anglujo.
67. Chinn, S-ro C. G., Welwyn Garden City, Anglujo.
68. Dickenson, S-ino E., Letchworth, Anglujo.
69. Fuller, S-ro S. T., Brighton, Anglujo.
70. Gregor, S-ro D. B., Northampton, Anglujo.
71. Pearson, S-ro M., Sheffield, Anglujo.
72. Wright, S-ro R. E. S., Sutton, Anglujo.
73. Ahlin, S-ro E. V., Brovallen, Svedujo.
74. Baaten, S-ro W., Utrecht, Nederlando.
75. Damsté, D-ro O., Amsterdam, Nederlando.
76. van Delden, S-ro Mr. P., Deventer, Nederlando.
77. van Dijk, S-ro J. P., Rotterdam, Nederlando.
78. Linnander, F-ino S., Stockholm, Svedujo.
79. Chiching, S-ro W., Bangkok, Siamo.
80. Malmgren, S-ro E., Stockholm, Svedujo.

81. Allen-Smith, S-ro H. W., Watford, Anglujo.
82. Edwards, S-ro G. D., London, Anglujo.
83. Harris, S-ro F., Bath, Anglujo.
84. Rapley, S-ro J. C., London, Anglujo.
85. Rudman, S-ro F. C., London, Anglujo.
86. Turton, S-ro G. H. A., Huddersfield, Anglujo.
87. Ferree, D-ro G. P., Mill Hall, Pa., Usono.
88. Belinfante, D-ro F. J., Lafayette, Ind., Usono.
89. Dodge, S-ro E. G., Washington, D.C., Usono.
90. Mitschke, S-ro F., Paterson, N. J., Usono.
91. Sumner, S-ro F. H., Sandlake, Ore., Usono.
92. Vedder, S-ro F. W., Washington, D.C., Usono.
93. Vidack, S-ro J., Seattle, Wash., Usono.

DONACOJ. G. W. Keiller 5s., F-ino E. I. Hodge 5s.,
G. T. J. Birch 5s., W. A. Cather 5s., D. Lilly 10s.,
S-ino D. H. Morris 30s., "Helpanto" 10s.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de
1949, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de 1948 :-

	1948	1949
Asociaj membroj ..	11587	12822
Individuaj membroj :		
MJ	985	863
MA	4541	4429
MS	345	365
Patronoj ..	21	17
DM	172	193
HM	56	60
	6120	5927
	17707	18749

Korespondantoj (sen la gazeto) traktitaj en la Centra
Oficejo en 1949 :-

Ricevitaj	9520	10013
Senditaj	24025	19064
	33545	29077

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*



**Esperanto-saluto
en Detroit,
Usono.**

Lumigo de
Walker & K-io,
reklamistoj.
Fotoj de E. Sievers.
Senditaj de
J. H. Murray.



ENIGMA KONKURSO N-ro 45

Solvejnin oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A, Avenue Molière, BRUSSEL-Forest, Belĝujo.

Solvejnoj de la problemoj en la konkurso N-ro 43:

N-ro 90: Al ĉiuj legantoj mi deziras agrablan kristnaskon kaj bonan novjaron. Slosilvortoj: keĝlo, absinto, bajoneto, vasalo, kanajlo, zingibro, marĉando, kristano, nur, anakronismo.

N-ro 91: Korano, rikano, paniko, peniko, pikedo, deponi, nepino, impone, premio, ampero, kamero, kareso, adreso, teraso, satiro, tirano, retino, natrio, naturo, katuno, katino, kanoto, korano.

N-ro 92: $\text{denominator}(j)=d.$, $\text{numerator}(j)=n.$ Ĉar la $d.$ el la unuaj tri frakcioj ne havas komunajn faktorojn kun tiuj el la lastaj tri, kaj do iliaj produktoj estas reciproke nedivideblaj, la du produktoj nur povas esti egalaj se ambaŭ valoras 1. La 6 faktoroj, kiuj troviĝas en la $d.$ de la unuaj tri frakcioj, do ankaŭ troviĝas en la $n.$ de tiuj frakcioj, nur alie kombinitaj. Tiel same por la dua trio da frakcioj. Ĉar A, C, D, kaj E estas lastaj ciferoj de iu nombro, ili ĉiuj 4 estas neparaj. Ĉar neniu nombro povas esti pli granda ol 3000 ($2491=47 \times 53$ estas la maksimumo), $A=1$. Aritmetikaj progresioj kun 1 kiel unu el la termoj povas esti 1, 2, 3, 4 aŭ 1, 3, 5, 7, kaj ĉar minimume 3 el tiuj 4 devas esti neparaj, 1, 3, 5, 7, estas la ĝusta progresio. C kaj D estas lastaj ciferoj de iu nombro, do ne povas esti 5. Tial $B=5$. La nombro ACCC do estas 1333, 1777 aŭ 1999, kaj ĉar la lastaj du estas primoj $C=3$, $D=7$ kaj do $E=9$. La unua $n.$, BE., nur povas esti 559, ĉar 553 kaj 557 estas primoj, 555 estas dividebla per 5 kaj 551 ne povas esti ĝusta, ĉar ĉiuj ciferoj 1 estas indikitaj. La kvara $n.$, 91, devas esti dividebla per unu el la faktoroj 53 aŭ 29 el la kvina $d.$, do nur povas esti $901=17 \times 53$. La tria $d.$, EE, devas esti dividebla per 13 do nur povas esti $299=13 \times 23$. La tria $n.$ devas finiĝi per 1, konsisti el 3 ciferoj kaj esti dividebla per 31, do nur povas esti $341=11 \times 31$. La sesa $d.$ devas finiĝi per 7, esti dividebla per 17 kaj do nur povas esti $41 \times 17=697$. La sesa $n.$ devas esti dividebla per 29, konsisti el 4 ciferoj kaj do havas kiel duan faktoron 37 aŭ 47. Nur 37 donas 7 por la cifero de la dekoj. Ĉar la kvara $d.$ devas esti dividebla per 37 kaj konsisti el 4 ciferoj, ties dua faktoro devas esti 47. La lasta faktoro 19 do troviĝas en la unua $d.$ kaj en la dua $n.$ Ni do trovas:

$$\frac{559}{209} \times \frac{437}{1333} \times \frac{341}{299} = \frac{901}{1739} \times \frac{1927}{1537} \times \frac{1073}{697}$$

Enigmo N-ro 96: forto, abelo, guano, flata, vakso, klaso, fiero, stano, brako, plori, karno, rusto, gloro, presi, kioma, raspi, kalko, piedo, triplo, tiaro, parko, valso, bildo, rango, moleo, monto, krado, sorpo, orclo, morto, amelo, frako. Al ĉiu el la donitaj vortoj aldonu sesan literon kaj reordigu ĉiun seson da literoj tiel, ke vi trovos novajn sesliterajn vortojn, kies signifoj estas: 1. venkosigno; 2. marmamulo; 3. delikata plumaro; 4. malfeliĉiga; 5. haŭtkovraĵo; 6. arbo; 7. milda vento; 8. supera ĉambro en parlamento; 9. vespego; 10. birdo; 11. sankta skribo; 12. birdo; 13. simio; 14. kredi, ke realiĝos tio, kion oni deziras; 15. ridiga; 16. gratante forigi ion; 17. subtera kanalo; 18. konfidi al iu gardotan; 19. marrabisto; 20. verko akre kritikanta ion; 21. virina ornamaĵo; 22. planto; 23. satano; 24. semo; 25. frukto; 26. jarparto; 27. monero; 28. dolĉaĵo; 29. homo; 30. maŝino; 31. glazuro; 32. monero. La aldonotaj literoj formas en la nomita sinsekvo proverbon.

Enigmo N-ro 97: a - a - a - as - bi - ci - co - da - di - dik - do - do - do - e - e - ek - fi - fo - fus - go - go - gra - ĝo - hi - ka - ka - ko - kri - las - le - li - lo - lo - lo - mi - mo - mo - mo - na - ne - no - no - nok - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - ok - op - or - po - ra - ran - re - ri - ri - ro - ro - ru - se - si - ta -

ta - ti - ti - to - to - to - to - tri - tu - tu - va - vre - za - ze. El la 80 ĉi-supraj silaboj formu 26 sesliterajn vortojn, kies unuaj literoj formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. La signifoj de la vortoj estas: 1. parte ŝanĝi ion; 2. kanonportilo; 3. alkala blanka metalo; 4. mantelo; 5. parto de la fiziko; 6. venena planto; 7. leĝforta ordono; 8. frukto; 9. okulmembrano; 10. kurblinio; 11. komerco; 12. haŭta malsano; 13. tia estas eburo; 14. pastro-kunveno; 15. germana monero; 16. fiksilo; 17. speco de greno; 18. malsanigaj haladzoj; 19. saltinsekto; 20. distingiga vesto; 21. dika vermo; 22. speco de pasero; 23. speco de strigo; 24. triumfa ceremonio; 25. senindulge severa; 26. plurjara herbo.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Bartholomeu al Ges-roj A. kaj L. en Bauru, Brazilo, filo **Francisco Eloi**, 2-an de dec. 1949.

Cameron al Ges-oj en Fort Wayne, Ont., Kanado, filino **Margaret Catherine**, 3-an de dec. 1949.

Fisher al Ges-oj H. F. en Londono, Anglujo, filo **Norman James**, 29-an de dec. 1949.

Van Gindertaelen al D-ro kaj S-ino Th. en Mechelen, Belĝujo filino **Nicole**, 18-an de dec. 1949.

Edziĝo

Middlemast-McGown. En dec. 1949 S-ro A. H. Middlemast kun F-ino M. McGown en Glasgow, Skotlando.

Al ĉiuj plej sinceran gratulon kaj bondezirojn.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la morto de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Archdeacon S-ro Ernest, 3-an de jan. 1950, 87-jara, en Versailles, Francujo. Honora Membro de U.E.A. Mondfame konata pro sia pionira laboro sur la kampo de la aviado. Senlaca laboranto por nia afero al kiu li donis la tutan moralan kaj materialan apogon de siaj energioj kaj famo.

Blaise Paul, 12-an de jan. 1950, 70-jara, en Heswall, Anglujo. Nekrologo sekvos.

Dubois S-ro Henri forpasis 27-an de dec. 1949, 91-jara, en Genevo, Svislando. Pioniro de Esperanto. Ĉeestis la enterigon aro da samideanoj kaj adiaŭan saluton faris Edmond Privat kaj Hans Jakob.

Holzhaus D-ro W. M. F. J., 13-an de dec. 1949, 59-jara, en Amsterdam, Nederlando, FD de U.E.A. dum multaj jaroj.

Nummelin S-ino W., 2-an de okt. 1949, en Malmö, Svedlando.

Stacy F-ino Elfrida G., 2-an de jan. en Buckhurst Hill, Anglujo. Esperantistino de 1906. Ano de fervora Esp-ista familio, kiu malavare subtenis la movadon kaj vigle interesiĝis precipe pri la blinduloj.

Stromboli D-ro Alfredo, unu el la plej eminentaj italaj samideanoj mortis 74-jara, 7-an de nov. 1949. Tre konata kemia konsultanto pri metalurgiaj aferoj, li dediĉis energie kaj arde sian liberan tempon al Esperanto. Fondis 1911 en Genovo *Itala Esperantista Kooperativo* kaj poste *Liguria Instituto de Esperanto*. De 1911 ĝis 1915 estris Italan Esperantistan Asocion. Verkis Esperanto-lerolibrojn por Italoj. Lama komitatano de U.E.A. kaj ano de I.C.K. Dumviva Membro de U.E.A., eks-Delegito en Pisa.

Wood S-ro John W. mortis 22-an de aŭgusto 1949, 80-jara en Zenith, Wash., Usono.

Leteroj de L. L. Zamenhof



La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus
retrovita korespondo kun la francaj
 eminentuloj. Prezento kaj komento de
Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906
388 paĝoj

2a volumo, 1907-1914
374 paĝoj

21 × 14.5 cm., bindita

NOVA PREZO : ĉiu volumo 21ŝ. 6p., afr. 9p.

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam
konigas detalojn de vivo, karaktero kaj
sentimento de la skribinto tiel ke personaj
leteroj kompletigas biografiojn. En tiu ĉi
libro ne temas nur pri leteroj de la majstro,
sed ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj
gvidantoj de nia ideo en la frua epoko de la
movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon
kaj detruos aron da legendoj.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

NONI KAJ MANI

de

Jön Svensson

Tradukis

Paul van den Hövel

Rakonto pri la spertoj de du malgrandaj
Islandaj knaboj, kiuj perdiĝis sur la
vasta maro.

Bele presita sur bonega papero.

160 paĝoj

Broŝ. 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk. afrankite



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

DIABLET' EN LA BOTEL'

de

Robert Louis Stevenson

Elangligis

Jozefo Seka

48 paĝoj : 1ŝ. 10p. aŭ 7 rpk., afrankite

Eldonita en Germanujo



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

E.P.C. prezentas

BRULANTA SEKRETO

kaj aliaj rakontoj

de STEFAN ZWEIG

tradukitaj de K. R. kaj P. E. Schwerin

Ĉiu el la kvar rakontoj estas streĉa elmontro de la interplekto de homaj emocioj, kaj malkaŝas profundan komprenon pri la psikologio de la individuo. Libro memorinda.

Ĉi tiu estas EPOKO—LIBRO n-ro 9

Prezo 3s. 9p., afranko 3p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ĉiu serioza Esperantisto, ĉu komencanto, ĉu progresinto, serĉas konstantan normon pri uzo de vortoj. Post longa intertempo denove estas havebla tiu jam fama konsultilo, kun ampleksaj klarigoj kaj citaĵoj el Zamenhofaj verkoj, la Tria Eldono de

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

de E. Grosjean-Maupin, A. Esselin,

S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien.

Esperanto-Esperanta.

Prezo 28s. 6p., afranko 9p.

Bonvolu atenti, ke ĉi tiu estas fotografa (ofseta) represo de la dua eldono, sed NE reviziita eldono. Tiu ne aperos ĝis post tre longa tempo.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.